
Sekr. Inĝ. Jan Werner, Kroftova 84, BRNO 16, Ĉeĥoslovakio

Ni citas el la rezolucio de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vieno de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970;

... La Kongreso ankaŭ konstatas, ke la grandega progreso sur la kampo de scienco kaj teknologio necese kaŭzas rimarkindajn disbranĉiĝon kaj kreskantan specialiĝon laŭ la fakoj kaj subfakoj, kaj ke la procezo de specialiĝo reflektiĝas en konsiderinda kresko de fakaj terminoj, komplete aŭ preskaŭ tute nekonataj ekster koncernaj fakaj medioj; ke, aliflanke, la lingvo-diverseco obstaklas internaciajn interŝanĝojn de scioj, novaj malkovroj kaj spertoj, kaj malebligas aŭ malfaciligas personan komunikadon. Rezulte, la lingva problemo sentiĝas ĉiam pli forte en ĉiuj branĉoj de la scienco kaj en ĉiuj fakoj.

La Kongreso ankaŭ rekomendas al la sciencaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj intensigi sian agadon en siaj respektivaj medioj aplikante al sia laboro la koncernajn punktojn de la Dua Baza Laborplano de UEA kaj la decidojn de la kunveno de la reprezentantoj de faksaj organizaĵoj, fakdelegitoj kaj delegitoj, okazinta dum la Kongreso ...

Neoficiala kunsido de la TEKN. SEKCIO de ĈEA en OPAVA.

La 4.7.1970 kunvenis en Opava 7 niaj membroj, inkluzive de 4 komitatanoj. Diskutitaj estis du aferoj: Laborplano de la Sekcio kaj organizo de Bibliografio de teĥnikaj veroj en esperanto. Pri profesia teknika-ekonomia informado referis s-o Z. Hršel.

TS de ĈEA fondas kaj prizorgas Bibliografion de Teknikaj Verkoj en Esperanto

Sen diversaj inform-centroj ne estas nun imagebla kiu ajn faka kamp. En ĉiu faka agado estas konstatebla pozitiva influo de eksteraj informoj. Male pro neinformiteco okazas mankoj en kvalito, financaj perdoj k.s.

Kian rolon en scienc-teknika-ekonomia informado ludu esperanto? Konkuri kun la naciaj inform-sistemoj ne estas eble precipe pro manko de monrimedoj /ekz. nur "Chemical Abstracts" havas jaran buĝeton de 12 milionoj da dolaroj/. S-o Simeon Simeonov el Sofio ĝuste diris en ISU - Helsinki - 1969, ke

"... en la baldaŭa estonteco esperanto havas realajn perspektivojn por praktika aplikado en la scienca informado, ĉefe kiel rimedo de personaj kontaktoj kaj eventuale kiel labora lingvo dum sciencaj kongresoj kaj konferencoj, t.e. en sfero de la neorganizitaj, nesistemaj formoj de disvastigo de informoj."

Sed ankaŭ tiun formon devas stimuli kelkaj faktoroj. Unua-vice temas pri faka terminaro, kiu estas rezulto precipe de ofta aplikado de la lingvo en fakaj medioj. Pro tio estas necese, ke pluraj fakuloj akceptu esperanton. Sed ties intereso siaflanke dependas de la riĉeco de faka literaturo, kaj ni scias, ke ĝi es-

tas tre modesta. Ankaŭ terminologio postrestas. Tia stato kompreneble senkuraĝigas ĉiun specialiston.

Estas necese disbati la fermitan cirklon! Ni volas agi tiu-direkte, per

- | | |
|--------------------------|--------------------|
| 1/ organiza laboro | 3/ eldona aktiveco |
| 2/ terminologia aktiveco | 4/ informa servo |

Laŭ decido de la kunsido en Opava /4.7.1970/ ni fondas BIBLIOGRAFION DE TEKNIKAJ VERKOJ EN ESPERANTO, per kiu ni deziras helpi en terminologia aktiveco kaj establi realan bazon por utiligadi almenaŭ la limigitan amplekson de fakaj publikaĵoj en esperanto.

Praktikaj detaloj koncerne la bibliografion:

- 1/ Nomo kaj adreso de la inform-peranto: Inĝ. Vlastimil Kočvara, Leninova 84, OPAVA, Ĉeĥoslovakio.
- 2/ Reto de kunlaborantoj informos la peranton per "notaĵo" pri novaj teknikaj verkoj en esp. en kontraktita sfero. Pri retrospektiva kompletigo zorgos la fakestroj de nia TS.
- 3/ En la bibliografio ni sekvas: librojn, artikolojn, firmaan literaturon, manuskriptojn.
- 4/ Ordigo de slipoj estos triobla: laŭ fakoj pere de universala decimala klasifiko /UDK/, laŭ aŭtoroj kaj laŭ interna vica numerado. Formato de la slipoj estas fiksita je A6 /148 x 105 mm/ - vidu la specimenon.
- 5/ En la laboro ni progresos laŭ koncernaj ĉeĥoslovakaj ŝtataj normoj:
ČSN 01 0094 Pravidla pro vypracování referátů /abstraktů/ odborné literatury.
ČSN 01 0195 Bibliografický /dokumentační/ a katalogizační záznam
ČSN 01 6904 Odkazy na literaturu /bibliografické citace/
- 6/ Bibliografian informan servon ni provizore planas ekde la jarmezo de 1971.
- 7/ En la "TS de ĈEA informas" ni aperigados bibliografion en formo de ĉefaj indikoj ekde la venonta jaro.

625.711.3

KOSSAKOWSKI, Mirosaw

Tri veturlarĝaj aŭtoŝoseoj

Scienca Revuo 21 1970 IV 5, n-o 2 /82/, p.61-64

5 il., 1 tab.

TS-We

70/1 - A

Triveturlarĝa ŝoseo havas 1,5 ĝis 1,7 - oblan vojkapaciton ol la duveturlarĝa. Kapacito de unu veturlarĝo rilate al aŭtorapideco. Rekonstruo de duveturlarĝa vojo je tri larĝoj, kaj tiu je kvar larĝoj.

Kiu el vi estas kompleza kunlabori pri la bibliografio? Ni bezonas principe sekvi ĉiujn esp. periodaĵojn. Ni bezonas traserĉi la malnovajn jarkolektojn. Interesas nin ankaŭ manuskriptoj kaj tradukoj. Koncerne la

manuskriptojn
kaj malnovajn
libroformajn
eldonaĵojn ni
petas vin:
Anoncu al la
sekretario de

TS titolojn de ĉiuj posedataj presajoj kaj verkoj en esp., el ĉiuj teknikaj fakoj. Sufiĉas sciigi nur titolon, aŭtoron kaj eldoninton. En kazo, se temas pri unikaĵo neregistrita ĉe ni; ni petus vin pri pluj indikoj. Ne preterlasu la eventon helpi nin!

Pri kunlaboro ni petas ankaŭ alilandajn esperantistojn. Ne forgesu ĉiam sendi al ni novajn firmaajn prospektojn. Informu nin pri fakaj prelegoj. Ni anticipu dankas!
V.K.-J.W.

Organizační řád sekce techniků byl předlozen ke schválení ÚV ČES dne 29.6.1970. Při 4.zasedání pléna ÚV dne 4.7.t.r. v Opavě bylo učiněno rozhodnutí, že předsednictvo projedná opět org. řády všech sekcí svazu a připraví na další zasedání ÚV případné změny a doplňky. Z tohoto důvodu nebyl organizační řád naší sekce dosud projednáván.

Ĉeĥa-hungara kunlaboro kaj kontakto kun la Teknika Ligo de ISAE estis traktataj inter nia sekretario Inĝ.J.Werner kaj Inĝ.F. Bors, prezidanto de TL, en Miskolo, hungario, fine de julio 1970.

K I E L N I D I R U

Ĉ: rýpadlo, bagr, A: excavator, F: excavateur, G: Bagger, R: ekskavator ?

- PV enhavas nur "DRAGMAŜINO" = speciala skrapmaŝino por forigi ŝlimon, sablon aŭ ŝtonojn el la fundo de maro aŭ rivero, konsistanta el metalaj ujoj fiksitaj sur unu senfina ĉeno, kiuj movigate elskrapas la fundon kaj suprenlevas la elskrapaĵon.
- PIV alportas nur "DRAGILO", kies signifo estas simila, sed pli larĝa: ...transportas materialon aŭ elskrapas la fundon kaj suprenlevas... Ĝi ampleksas: 1/ fosi sablon ktp. el la fundo a/ por fari entranĉon por strato, fervojo ktp.; b/ por pliprofundigi riveron, havenon ktp.; 2/ por elpreni konstru- aŭ alian materialon /ekz.karbon/ el la fundo aŭ provizejo.
- La sliparo per Duden-Bildvortaro prezentas ELKAVIGATORO /DB196/1/.
- Inĝ. A. Bednařík komentarias la lastan proponon: ". . Ŝajnas, ke iu uzis aŭ enkondukis tiun terminon influite de relative internacia A: excavator. Tamen la radiko "kavo" ne tre trafe esprimas esencon de la nocio, konsiderante celon, teknologion ktp, de la maŝino. Miaopinie ja temas pri maŝino movebla, uzata por terlaboroj, kiu disigas teron, ŝtonŝutaĵon, rokon aŭ rubaĵon kaj transportas ĝin je distanco de propra atingo. Do pri elkavigado temas nur en kelkaj kazoj ĉe subterena fosado kaj sekve tiu eco ne estas esenca.
- Pluraj vortaristoj faciligis al si laboron per simpla DRAGI = bágrovat /G: baggern; F: draguer, excaver/ kaj DRAGMAŜINO = bagr, rýpadlo /č/. - /R. Hromada 1961, Bokarev 1966/.

- Pripensataj estis plu ekz.: fosadoro, ŝoveladoro, skrapadoro, dragadoro - ev. kun la pseŭdosufikso -atoro. /Inĝ. A. Broise/
- 1/ Se ni rekonas PV, estas necese trovi nocion por la maŝino ~~XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX~~ foslabora Ĉ: bagr, rýpadlo, A: excavator.
 - 2/ Se ni agnoskas PIV, estas necese trovi nocion por la maŝino sen "trog-bendo".
 - 3/ Pliampleksigi signifon de DRAGMAŜINO, DRAGILO.
 - 4/ Akcepti ELKAVIGATORO.
 - 5/ Pro internacieco akcepti EKSKAVATORO.
 - 6/ Modifi la 4-an alt. je ELKAVATORO, kiu estas pli konciza, kaj sonproksima kaj etimologie parenca al la internacia radiko. La teknika pseŭdosufikso -ATORO estas kutime ligata al verba radiko. Sed substantivan radikon oni ja darfis verbigi rekte sen -ig-sufikso /form-i, norm-i, klas-i, lim-i, engaĝ-i k. s./, do ELKAV-I /tr/ kaj ELKAVATORO estas uzeblaj. La termino validu konvencie por ĉiuj universalaj fosmaŝinoj krom la surakvaj /dragmaŝinoj/. Specialaj termaŝinoj, ekz. por ŝarĝi, bori, por deponi ŝutmaterialon, fosi tranĉeon k.s., havu specialan nomon.
 - 7/ Aliaj alternativoj.
Rimarkojn koncerne la traktitan temon sendu al la sekr. de TS.

TS de ĈEA informas-----aperas neregule-----oktobro 1970----/3/.
